

LA MALLARĜA VOJO

N-ro 3 / 2017
9. Jarkolekto

# Jen la volo de Dio: via sanktigado

<u>Biblia citaĵo:</u>

Serĉu pacon kun ĉiuj, kaj la sanktigon, sen kiu neniu vidos la Sinjoron!

Hebreoj 12,14

## Enhavo


| | |
|---|---|
| Kara leganto | 3 |
| La olda viro kaj sanktigado | 4 |
| Tro malfrue! | 6 |
| Dio ilin vestis! | 16 |
| Tatuado kaj penetrado | 18 |
| Ne peku! | 21 |
| Prireformacia kongreso | 41 |
| Diversaĵoj | 44 |



Eldonisto:
**Christlicher Gemeinde-Dienst (CGD)**
Verein zur Förderung christlicher Werke und Gemeinden Pforzheim e.V.
Email: info@cgd-online.de
Homepage: www.cgd-online.de

**Sekretariejo** (redaktaj kontribuoj)**:**
Dr. Lothar Gassmann
Am Waldsaum 39
D-75175 Pforzheim
Tel. (AB) 07231-66529
Fax 07231-4244067
Email: Logass1@t-online.de
Homepage: www.L-Gassmann.de

Kompostado kaj fotoj: Lothar Gassmann
Frontpaĝa foto: Gemeindesaal in Pforzheim
Kajerkovrilo: Werner Fürstberger
Presado: Druckmaxx, Blekendorf
Esperantigis: Vinko Ošlak


Por la subskribitaj kontribuoj la aŭtoroj respondecas por sia enhavo. Ĉiuj kontribuoj en tiu ĉi kajero – krom se alie indikite – rajtas, se neanĝitaj, sed kun indiko pri la fonto, esti kopiitaj, presitaj kaj tradukitaj en aliajn lingvojn. Ni petas specimenon al la adreso de la sekretariejo.
Koran dankon!


**CGD-Administrejo**
(dissendado, subtenatestiloj):
Thomas Ebert, Alemannenstr. 5
D-75038 Oberderdingen
Tel. 07258-295452
Email: info@cgd-online.de


**Donackontoj**

***Germanio:***
Sparkasse Pforzheim-Calw
Christl. Gemeinde-Dienst Pforzheim
IBAN: DE89 6665 0085 0007 2389 67
BIC oder SWIFT: PZHSDE66

***Aŭstrio:***
Raiffeisenbank Leiblachtal
Christl. Gemeinde-Dienst Pforzheim
IBAN: AT07 3743 9000 0380 8045
BIC: RVVGAT2B439

***Svislando:***
Die Schweizerische Post:
Christlicher Gemeinde-Dienst Pforzheim
Verein zur Förderung christlicher Werke und Gemeinden e.V.
DE-75175 Pforzheim
IBAN: CH32 0900 0000 6074 9747 5
BIC: POFICHBEXXX

La gazeto LA MALLARĜA VOJO estas distribuata surbaze de donacoj al la interesitoj (abona kontribuo pojare 15,- € inkl. sendado). La kostoj estas kovrataj per liberaj donacoj de la legantoj. Dankon, se vi nin helpas. CGD estas organizaĵo de komuna intereso. Donacoj ĝuas ĝis 20 % da jarenspeza imposta liberigo. **Bonvolu indiki okaze de via donaco vian poŝtkodon kaj la kodon de „Freundesnummer“.** Tion vi trovas sur la adresspaco dorsflanke de la kajero.
Koran dankon!

# Kara leganto!

Jam antaŭ 20 jaroj mi skribis la sekvan mortanoncon por la „Kristana Okcidento“:

**Sodomo kaj Gomoro niatempe**

Unue blasfemado estis tolerita.
Poste pornografio.
Poste abortado.
Nun sekvas homseksualeco kaj lesbumado.
Baldaŭ venos poligamio kaj eŭtanasio,
incesto kaj sodomio.
Tiu ĉi sinsekvo estas nepra.
Kiam la lasta ŝtupo estos atingita,
la homaro troviĝos en la sama situacio,
kiel la samtempuloj de Noaho antaŭ la granddiluvo
kaj la urboj Sodomo kaj Gomoro antaŭ ilia pereo.
Post tio troviĝos nur plu *unu* gradiĝo malsupren:
la tutmonde publika adorado de Satano
kaj de ties filo, de Antikristo,
preparita per la tutmonda reto,
pere de la religio de laŭplaĉo
kaj pere de la ĉiam pli evidenta batalo
kontraŭ Jesuo Kristo kiel la unuela vojo al Dio la Patro.
Tamen la firma fundamento de Dio staras, havante la jenan sigelon:
*„La Sinjoro konas tiujn, kiuj estas liaj, kaj:*
*Foriru de maljusteco ĉiu, kiu nomas*
*la nomon de la Sinjoro”* (2. Timoteo 2,19).

Per la plej novaj leĝiniciatoj pri la „geedziĝo por ĉiuj“ oni venis al la fintempaj Sodomo kaj Gomoro grandpaŝe pli proksimen.

Anstataŭ ŝovi la kapon en sablon aŭ fali en panikon, ni devus tiom pli arde postsekvi nian Sinjoron Jesuon Kriston kaj iradi en sanktiĝado. Tiu ĉi eldonita numero deziras kontribui por kreski en la kredvivo kaj por iĝi pli simila al la Sinjoro, por ke ni – purigitaj per lia sango – lin iam povos rigardi en la ĉielo de vizaĝo al vizaĝo.

Dio, la Sinjoro, vin benu!

*Via Lothar Gassmann*

# La maljuna viro …

## *kaj la sanktiĝado*

La temo pri sanktiĝado alprenas en la Biblio larĝan spacon. Spite tion dum la anoncado relative malofte ĝi aperas. Kio la sanktiĝado estas? Kia estas ĝia praktika aspekto? „Serĉu pacon kun ĉiuj, kaj la sanktigon, sen kiu neniu vidos la Sinjoron“ (Heb 12,14). „Ĉar jen estas la volo de Dio, via sanktiĝo“ (1 Tes 4,3). Sanktigado ne estas disponigita al nia plaĉo.

La maljuna viro scias, ke la sanktiĝo ne estas spasma penado de la homo, por antaŭ Dio povi senmakula stari. Kiu tion provas, tiu malsukcesos. Tio finiĝas per kolapso. Iu farmisto dum monatoj provis sian kapron malkutimigi manĝadon. Kiam li finfine sukcesis, la kapro estis morta. Tio kun vera sanktiĝo ne havas ion komunan.

La sanktiĝado komenciĝas per novnaskiĝo de la homo. Dio volas, ke ni estu protektataj en nia kredvivo. La sanktiĝo unuarange estas la faro de Dio super ni. La Sankta Spirito de Dio nin purigas per akvolavo de la vorto de Dio. La sanktiĝon oni ne povas mem produkti. Dio volas sian faron fari mem. Por tio Li prenas sian tempon. La sanktiĝo estas proceso, ĉe kiu oni daŭre dependas de Dio. La Sinjoro Jesuo diris al siaj disĉiploj: „Estu perfektaj, kiel mia Patro en la ĉielo estas perfekta!“

La maljuna viro skuiĝas antaŭ tiu ĉi vorto. Kiamaniere do li povus esti perfekta? Kiamaniere li povus realigi tian sanktecon? Tio tamen ne estas ebla! Sed la maljuna viro ankaŭ scias, ke ĉio, kio ĉe la homo estas neebla, ĉe Dio estas ebla. La Sinjoro Jesuo promesis: „Kaj por ili mi konsekras min, por ke ili mem ankaŭ estu konsekritaj en la vero“ (Joh 17,19). La Sinjoro Jesuo estis por ni farita por sanktĝo. Se ni estas nenio, la Sinjoro estas ĉio. Ĉio estas graco.

Kiam Dio al la maljuna viro malfermas la okulojn kaj al li montras, kio en lia koro troviĝas, li devas hororiĝi. Jen malfermiĝas abismoj. Jen malaperas ĉia fiero. Tio donas al onia blovita kapo normalan dimension. Tio faras onian koron sentema. Tio estas praktika sanktiĝo.

Laŭ mia scio la Sinjoro Jesuo nur *unu fojon* diris: „Lernu de mi!“ Li ne diris: Lernu de mi, kiamaniere oni povas sukcese evangelizi la mondon! Lernu de mi, kiamaniere oni povas detrui la farojn de la diablo! Sed li diris: „Metu sur vin mian jugon, kaj lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj korhumila“ (Mat 11,29). Kial la Sinjoro Jesuo diris ĝuste tion ĉi?

La maljuna viro konjektas, ĉar tio estas la plej nepra afero, kion li devas lerni. „Estas dirite al vi, ho homo, kio estas bona kaj kion la Eternulo postulas de vi: nur agi juste, ami bonfarojn, kaj esti modesta antaŭ via Dio“ (Miĥ 6,8). Tio estas la sanktiĝo. Sed la maljuna viro malkovras ĉe si mem ankoraŭ daŭre kaŝitan fieron. Li ankoraŭ ĉiam pretendas io esti, antaŭ si mem, antaŭ la homoj kaj antaŭ Dio. Tio kuŝas en lia naturo.

Ne estas bele por ni, kiam Dio revelacias, kio en niaj koroj troviĝas. Por la ĉiela regno tamen tio estas la plej altaj momentoj, ĉar la Sinjoro sanktigas.

„Sed el Li vi estas en Kristo Jesuo, kiu fariĝis al ni saĝeco el Dio, kaj justeco kaj sanktigo, kaj elaĉeto“ (1 Korintanoj 1,30)

Bone por tiuj, kiuj iradas antaŭ Dio en sankteco,
agante laŭ Liaj vortoj kaj vivante daŭre laŭ ili;
vere elkore serĉas Dion
kaj Lian atestadon respektas.

Profunde el mia koro mi diras: Ĉiama danko al Vi,
ja Vi min instruas leĝojn de Via justeco.
Atribuu al mi Vian gracon daŭre; mi volas Viajn leĝojn teni.
Neniam min forlasu!

Ja koro mia en fidelo pendas firme ĉe la vorto Via.
Sinjoro, faru super mi la plejan bonon, cetere ekdamaĝos.
Kiam Vi min estras, kara Dio, tiam mi povintas ĝuste kuri
sur la voj' de Viaj leĝordonoj.

La vorto Via, ho Sinjoro, ne pereas, poreterne restas,
ĝis la lasta horizont' de la ĉielo, daŭre sin movanta.
Via vero restas ĉiutempe sama kiel fundament' de l'tero,
per tenad' de Via mano.
(Cornelius Becker).


*Rolf Müller, Wilkau-Hasslau*

# Tro malfrue!

Procedoj antaŭ la juĝtrono de Dio

*De pastoro Ernst Modersohn*

En la Biblio, Apokalipso 20,11-15 staras skribite:



**Kaj mi vidis grandan blankan tronon, kaj la Sidanton sur ĝi, antaŭ kies vizaĝo forflugis la tero kaj la ĉielo; kaj ne troviĝis loko por ili. Kaj mi vidis la mortintojn, grandajn kaj malgrandajn, starantajn antaŭ la trono; kaj libroj estis malfermitaj; kaj estis malfermita alia libro, kiu estas la libro de la vivo; kaj la mortintoj estis juĝataj el la skribitaĵoj en la libroj, laŭ siaj faroj. Kaj la maro liveris la mortintojn, kiuj estis en ĝi; kaj la morto kaj Hades liveris la mortintojn, kiuj estis en ili; kaj ĉiu estis juĝata laŭ siaj faroj. Kaj la morto kaj Hades estis ĵetitaj en la fajran lagon. Tio estas la dua morto – la fajra lago. Kaj se iu ne troviĝis skribita en la libro de vivo, tiu estis ĵetita en la fajran lagon.**

*Estas profunda interna tendenco de la homa koro, okupiĝi ne nur pri la ĉiutagaj kaj materiaj aferoj, sed malkovri la vualon de la estonto kaj vidi la misteron.*

*La sekvantaj vortoj estas provo preni tion kaj ĝin tiel prezenti, kiel la afero iam en la tago de la juĝo de Dio kun la homoj plej verŝajne okazos. Okazos disraviĝoj kaj malkovroj, pri kies vero kaj energio apenaŭ iu niatempe eĉ nur de tre malproksime povas havi imagon. Ĉi tie proponi orientpunktojn, jen la senco de tiu ĉi teksto.*

Antaŭ la trono de la Mondjuĝisto troviĝas nekalkulebla homamaso. Homoj el ĉiuj generacioj kaj nacioj atendas sian juĝon. Mirindaj estaĵoj, egalaj al anĝeloj, iras tra la vicoj kaj superrigardas la situacion. Ili aranĝas la homojn en grupojn.

La homaj okuloj ne povas rekoni, laŭ kiuj signoj tiu aranĝado okazas. Rapide kaj sekure venas kelkaj ĉi tien kaj la aliaj tien.

En iu grupo aŭdiĝas laŭta protesto kontraŭ tiu ordo. Estas la grupo de la murdistoj. – „Mi ne apartenas ĉi tien!“ – „Mi ne estas murdisto!“ reeĥas en la vicoj. Sed ili sian lokon ne povas forlasi. Kaj poste unu post la alia estas forprenitaj.

„Mi estas nenia murdisto! Mi neniam al iu homo kaŭzis ion dolorigan!“ – Tiel la unua krias, sen atendi la akuzon, kiu devus esti kontraŭ li dirita.

„Vi estas neniu murdisto, ĉu?“ respondas la Juĝisto. „Se tiel, mi devas vian memorkapablon iomete helpi.“ Li vinkas permane kaj unu el la anĝeloj malfermas grandan libron, kie la ŝuldkonto de la viro estas enskribita. Poste li legas protokolon. Estas jam post longa tempo, kiam tio okazis. Jaroj kaj jardekoj post tio jam pasis.

En la urbo vivis juna knabino el boneduka familio. Por la mano de ŝi varbis sin juna viro. Sed lia nomo ne havis bonan renomon, tial ŝi malakceptis lian varbadon. Tio lin kolerigis kaj li venĝis sin tiel, ke li elpensis pri la knabino malican kalumniadon pri la estiminda juna knabino kaj ĝin kolportis. Nek unu vorto en tio estis vera. Sed unu rakontis tion al la alia. Tio disvastiĝis kiel ĉenincendio tra la urbo. „Ĉu vi jam aŭdis?“ – „Ĉu vi tion jam scias, kion ŝi faris?“ Kaj tiel nun la honoro de la juna knabino estis ĵetita en malpuron.

Tion la knabino aŭdis kaj ŝi eĉ ne havis plu emon iri inter la homojn. Ŝi sidis en sia ĉambreto kaj meditis kaj grumblis, ĝis ŝia spirito malheliĝis. Kaj iun vesperon ŝi iris en akvon kaj en ĝi dronis. –

Tiu ĉi protokolo estis prezentita. Kaj tiam demandas la Juĝisto: „Ĉu vi rememoras tiun ĉi okazintaĵon?“ La viro antaŭ la trono kapjesas. Liaj genuoj komencas tremeti.

„Ĉu vi same ne kalumniis kaj malbonparolis, kiel ankaŭ la aliaj?“ –

„Jes, tion mi faris, sed“ –

„Kiu do pelis la kompatindan infanon en morton? Ĉu tio ne estis vi, vi kaj viaj kamaradoj, estintaj tiel fervoraj la kalumniadon kolporti? Vi helpis ilin murdi… Ĉu vi havas ion por pledi?“ –

Kun tremantaj lipoj la viro diras: „Ne.“ –

„Kulpa je murdo, je helpo ĉe la murdo!“ aŭdiĝas la verdikto.

La viro estas forprenita. –

Iu alia estis prenita antaŭ la tronon. Ankaŭ nun la sama senhelpeco kiel ĉe la antaŭa.

„Vi pledas por ne esti murdisto, ĉu ne?“ –

„Ĉiukaze. Io tia neniam venis en mian menson. Mi ĉiam estis deca homo.“ –

„Ni vidos!“ –

Manvinko, kaj jam iu alia viro estas vokita antaŭ la tronon. „Ĉu vi tiun ĉi viron konas?“ –

„Mi ne rememoras.“ –
„Alrigardu lin foje pli precize. Vi devas lin koni.“
„Jes, nun mi komencas lin rememori.“ –
„Nun, kion vi scias pri li?“ –
„Se mi ne eraras, tiu ĉi viro iun tagon venis al mi kaj min petis doni al li iom da lakto“ –
„Tute prave. Ĉu vi ankoraŭ scias, kion li diris?“ –
„Li diris, ke li lakton bezonas tiel nepre por siaj etaj infanoj, kiuj estas tiel mizeraj. Kaj li nenie povus ion ricevi, ĉu mi do povus lin kompati.“
„Vidu, vi tute bone rememoras. Tiel vi ankaŭ certe scias, kion vi respondis. Pripensu iomete!“ –
„Jes, mi ĝin denove havas. Mi diris, ke mi ne havas superfluan lakton, ĉar la porkoj ĝin bezonas.“ –
„Tute ĝuste, tiel vi diris. Kaj tiel vi ne diris nur unu vojon, sed plurfoje. Kaj kiel la viro vin petegis, vi tion refutis. Ĉu ne vere, ĉu vi konfesas tion?“ –
„Jes, tion mi konfesas. Sed ne estis alia ebleco. Kiel do mi povus nutri miajn porkojn?“ –
„Jes, kompreneble, tio estis via zorgo. Ĉu vi scias, kio okazis al la mizeraj infanoj?“ –
„Ne, tion mi ne scias.“ –
„Tiam vi devas tion aŭdi. Ili mortis; mortis pro nesufiĉa nutrado. Vi povus ilin reteni en vivo. Sed vi preferis viajn porkojn nutri per lakto. Se la etaj infanoj pro tio devos morti, tio por vi estis egala. Kiu do havas la morton de tiuj infanoj sur sia konscienco?“ –
Responde al tiu demando vea krio. –
„Kulpa je murdo,“ aŭdiĝis la verdikto. Kaj la kondamnita estis forprenita.

Jam staras la tria antaŭ la trono. Sinjoro, aparteninta al „pli bonaj tavoloj“. Li sentas ĉion pli-malpli kiel ofendon, ke li estis starigita en la grupon de murdistoj.
„Mi verdire ne scias, kiamaniere mi ĉi tien venas,“ li diras. „Kiamaniere oni min povas starigi inter la murdistojn. Tio devas esti miskompreno. Mi trovas tion maljusta, esti tiel traktata.“
„Vi estis juristo, ĉu ne?“ –
„Jes, tio mi estis, kaj pro tio mi petas por esti traktata laŭ mia klaso.“
„Amiko, al vi okazas neniu maljusto. Ĉi tie regas la netuŝebla justo.“ –
„Sed mi tamen ne estas murdisto! Kiel oni povas min ĉi tie marki kiel tian?“ –
„Silentu kaj aŭskultu! Estis en via junaĝa tempo. Vi estis studento. Ĉu vi rememoras tiun tempon? –
„Ho jes, tre precize.“ –
„Via dommastrino havis filinon, kiu al vi plaĉis. Mi vidas, vi rememoras pri.“ –

„Jes, mi rememoras."

Sed la tono, per kiu tiuj vortoj estis diritaj, sonas tute alie ol la memcerta parolo antaŭe.

„Nun, tiam vi certe rememoros tiun vesperon, kiam vi el la rondo de viaj kamaradoj revenis hejmen kaj ne estis plu tute sobra. Ĉu vi ankoraŭ scias, kio poste okazis?" –

„Nur malhele tio staras antaŭ mia animo." –

„Tiam vi ĉe la knabino forrabis ŝian honoron kaj virgecon. Kaj ŝi malfermis la kranon por gaso kaj sin venenigis." –

„Pro tio ŝi tion faris, ĉu?"

„Jes, pro tio. Vi neniam plu pri tio pensis. Vi ĝojis, ke tiu malfeliĉo tiel rapide okazis, por kovri la sekvojn de via peko. Sed nun via peko vin trovis. Vi murdis ŝin."

La viro respondis per neniu vorto. Liaj genuoj malstabilis. Li devis pli porti ol li opiniis. Malantaŭ li aŭdiĝas la verdikto: „Kulpa je murdo."

Sed la vico ankoraŭ ne estas elĉerpita …

Nun paŝas viro antaŭ la tronon, kies kapo en la konscio pri sia honoreco kaj senkulpo estis alte tenita. Kiu nur povus lin pri io kulpigi?

„Kio fariĝis el via filino Marie?" –

Pri tio la viro tute ne pensis. Li por tiu demando ne estis preparita. –

„Mia filino Marie, ĉu?" li ripetis. –

„Jes, certe, el via filino Marie." –

„Ŝi bedaŭrinde iel perdiĝis. Mi ne scias, kio el ŝi iĝis. Ŝi por mi estas finita afero. Ŝi vivis malbonan vivon." –

„Kiamaniere tiel okazis, ke ŝi tian vojon surpaŝis?" demandas la voĉo de la Juĝisto.

„Jes, kiel tio okazis? Mi ne scias. Mi ĉiujn miajn infanojn orde kaj severe edukis. Mi ne scias, pro kio tiu ĉi tiel falis el la normo."

„Vi do ne scias, ĉu? Se tiel, mi devas vian rememoron iomete helpi. Ĉu vi ankoraŭ rememoras, kiel Marie volis partopreni la biblian horon?" –

„Ho jes, tion mi ankoraŭ scias."

„Kaj kion vi tiam diris?" –

„Nun, mi tion al ŝi malpermesis. Mi ne volis, ke en mian familion envenu bigoteco." –

„Kaj kiam ŝi tamen volis iri, vi ŝin batis, ĉu ne?" –

„Jes, tion mi faris. Tio tamen estis mia bona rajto kiel la patro, ĉu?"

„Kaj tiel vi elbatis el ŝi komplete la penson pri tio, tio estas vera. Tiel ŝi la biblian horon ne frekventis. Sed ŝi iris en la mondon. Kaj vi mem enkondukis ŝin en la mondon. Kaj tiel ŝi atingis sian falon. Dum iu dancokazo. Kaj vi elpelis ŝin poste

el la domo kriante: ‚Por iu tia ne estas plu loko. Ni estas decaj homoj!' Ĉu ne, vi scias tion ankoraŭ?“

„Mi scias ankorau,“ sonis la tremanta respondo.

„Kaj post tio via Marie dekadentis, surtretita en la koto de la strato. Ŝi mortis per sia korpo kaj animo kaj pereis. Kiu kondukis ŝin sur la vojon de pereo? Vi silentas, ĉu? Donu respondon: Kiu ŝi kondukis sur la vojon de la pereo? Kiu ŝin malhelpis iri sur la vojon por postsekvi Jesuon?“

La Juĝisto faris paŭzon. Ĝemante venis la respondo: „Mi tio estis!“

„Jes, vi tio estis, vi vian filinon Marie ne mortigis nur korpe, vi mortigis ankaŭ ŝian animon. Vi meritas apartan punon – muelilan ŝtonon, alportu!“

Kaj la servantaj anĝeloj alprenas muelilŝtonon. „Kiu unu el miaj plej malgrandaj venigas en falon, por tiu estus pli bone, se ĉirkaŭ lian kolon estus pendigita muelilŝtono kaj li estus dronigita en maro, kie la plej granda profundo estas. For de Mi!“

Nun staras antaŭ la trono virino. Ŝi aperas sub vidvina vualo.

„Vi estas vidvino ĉu ne?“ –

„Nu jes, mi mian edzon perdis.“ –

„Kiamaniere li mortis?“ –

„Li falis dummilite.“ –

„Ĉu vi iel ajn havis partoprenon ĉe lia morto?“ –

„Ĉu mi? Mi tamen ne kunĉeestis en la milito!“ –

„Ne, vi ne ĉeestis. Sed kiel estis antaŭ la milito? Ĉu vi ĉiam havis bonan interkomprenon?“

„Jes, tion ni havis.“ –

„Ĉu ĉiam?“ –

„Nu, foje ni havis bagatelajn miskomprenojn, kiel en ĉiu geedzeco.“

„De kie tiuj bagatelaj miskomprenoj venis?“ –

„Bone, mi estis iomete ĵaluza.“ –

„Ĉu vera kialo por tio troviĝis?“ –

„Fakte ne, sed mi fantaziis, ke mia edzo ŝatis vidi iun parencinon.“ –

„Ĉu vi povis al li ion ajn riproĉi?“

„Tion mi ne povis. Sed mi havis impreson, ke li ĝojis, kiam ŝi venis nin viziti.“ –

„Kaj jen vi estis ĵaluza, ĉu? Tion vi kontraŭ li ankaŭ disparolis, ĉu ne?“ –

„Foje jes.“

„Ĉu ne temis ĝuste pri tia ĵaluzscenaĵo, kiam la militista alvoko venis?“ –

„Jes, tiel tio estis.“ –

„Kaj ĉu vi sub via misfarto ne diris al li: Se nur vi ne estus revenonta!“ –

„Ho jes, tion mi fakte diris.“ –

„Ĉu vi ne aldeziris por li morton?“ –

„Tian vorton oni pretere diras.“

„Sed en la koro oni tamen pensas ankaŭ, kion la buŝo eligas. En la koro vi havis penson, kiun via buŝo eldiris, tion vi tamen ne povas negi. Ĉu vi scias, ke antaŭ Dio ankaŭ jam la penso validas kiel faro? Ĉu vi ne scias, ke la Sinjoro vidas en la koron? En via koro vi estas – murdistino. Vi vian edzon ne mortigis per faro; sed per via penso. Vi en la lernejo iam lernis: Kiu sian fraton malamas, estas murdisto. La vorto vin kondamnas.“ –

La kondamnita kunfalis. Anĝelo alpaŝas kaj forkondukas ŝin.

Oni vokas geedzan paron.

„Kie troviĝas viaj infanoj?“ ili estas demandataj. –

„Niaj infanoj? Ni havis nur unu filon, kaj tiun ni perdis dum la milito. Ni terure suferis pro tio. Li estis nia unuela espero. Sed pli da infanoj ni ne havas.“

„Ĉiuokaze, via filo certe estis prenita dum grandaj murdadoj; ĉar sur via konscienco pezas tri aliaj infanoj!“ –

„Ho, ĉielo, tio certe estas erarŝanĝo! Ne, kompatema Dio, ni tamen ne havis pliajn infanojn, kaj nun ŝajnas eĉ, ke ni ilin mortigis?“ kriis la edzino tute perpleksita.

„Kaj tamen ĝuste tiel estas: sur viaj manoj gluiĝas la homa sango! – Mi konfidis al vi kvar etajn estulojn, sed vi volis havi neniujn infanojn. Por vi tro da laboro. Vi kompreneble diris, ke estus tro multekoste kaj trans viaj eblecoj, nutri kvar infanojn. Sed vi volis ĝui la vivon. Pro tio vi serĉis eblecon de ili liberiĝi. Tri el ili vi murdis antaŭ ili povis esti naskitaj. – Parolu, ĉu ne tiel estis?“

„Jes, se – tio estis peko … ni tion ne sciis,“ balbutis nun la edzo, kiu pro konsterniĝo ne povis plu ion diri. –

„Kio?“ tondris la demando de la Mondjuĝisto, „vi diras ne scii, ke la abortado kaj la konscia mortigado de la koncipita homa vivo estas murdo? Ne provu vin ekskuzi, vi tion tamen sciis! Vi diference pri tio parolis, kiam via Karlo dum la milito falis. – Ĉu vi ne plu scias, Max Dolzig, kiel via edzino al vi tiam eldiris riproĉojn, ke vi ŝin foje sub danĝero je ŝia vivo devigis per tiel horora maniero detrui la senkulpan vivon? Sed vi ne pretis vin kontroli kaj viajn pasiojn submeti al bridiloj. Se vi sincere preĝus, vi ricevus povon iĝi mastro de siaj pasioj. Sed vi tion ne faris kaj vi tion fari ne volis! – Mi volis konfidi al vi infanojn, kiuj estus subteno kaj ĝojo dum via alta aĝo – sed vi ilin detruis. Du el viaj infanoj estis predestinitaj fariĝi misiistoj kaj fari grandajn farojn sur la tero kaj kontribui al la feliĉo de la tuta familio. – Kaj kion vi faris? Vi tiujn du savantojn antaŭ ilia naskiĝtempo murdis…“ –

Svene ili post tiuj ĉi vortoj kunfalis.

Apenaŭ tiu ĉi scenaĵo pasis, ĵetas sin virino kiel malesperiĝinta antaŭ la tronon, ĵetas sin planken kaj krias kun ploranta voĉo:

„Kompaton! Kompaton! Mi estas murdistino! Mi murdis ambaŭ miajn infanojn! Mi estas kulpohava! Mi estas kulpa…!“ –

Afable la kompatinda virino estas levita de la anĝeloj, kiuj al ŝi diras nun silenti, ke ĉio estos bone traserĉita.

La konto de ŝa vivo estas malfermita kaj antaŭlegita. Dum sia junaĝo, tiel la rimarko, ŝi estis pia knabino. Pli poste ŝi edziniĝis kun senkreda viro kaj vivis kun li en malfeliĉa geedzeco. Li estis krudulo, li mistraktis ŝin ofte, li drinkis kaj malĉastis kun aliaj virinoj. Tiel ŝi estis devigita la vivnepraĵojn por siaj infanoj mem perlabori, ja ŝi ricevis nenian monon. Malfacile ŝi puŝis sin tra la vivo, iĝis ege nervozema kaj per tempo ricevis manion esti persekutata. Ŝi ricevis ideon, ke ŝia edzo kaj ŝiaj infanoj ŝin volas venenigi. Tiu ideo kreskis tiel alten, ke ŝi en iu nokto ambaŭ siajn infanojn strangolis kaj post tio fuĝis de tie. Post du tagoj ŝi, plene elĉerpita kaj senpova, estis trovita de la polico. Sed baldaŭ post tio ŝi mortis, sen antaŭe rericevi klaran menson, en iu psikmalsanejo.

Nun – tie alifnalke, en la transcendo – ŝi vidis tute klare antaŭ si; ja post la formeto de la surtera korpo kun la tuta sufero kaj difektoj la spirito iĝis libera kaj senĝena. Pro tio ŝi akuzas sin mem kaj krias: „Mi scias, mi meritas la inferon; ja mi faris duoblan murdon.“

„Grethe Wandow!“ ekeĥis la majesta voĉo de Dio. „Estis demono, kiu vian menson ennoktigis kaj vin pelis en malesperiĝon ĝis la murdo.“

„Sed kiamaniere povis okazi, ke mi estis pelita tiel foren? Mi tamen amis miajn infanojn super ĉio!“ –

„Tion vi devas aŭdi! – Ĉu vi rememoras ankoraŭ vian junaĝon?“ –

„Jes, antaŭ mia spirito ĉio iĝas klara.“ –

„Ĉu vi ankoraŭ scias, kiel vi komencis vian Savanton ami, kaj kiel vi ĉe tio iĝis gaja kaj feliĉa!“ –

„Jes, mi scias, tio estis la plej bela tempo de mia vivo, kiam mi vere estis diotima.“

„Ĝuste tiel! Mi metis en vian animon pecon de la eterna Sankta Spirito kaj de mia amo, ĉar vi estis honesta kaj min vere serĉis. Sed kion vi poste faris kun la sparko de mia dieca vivo? – Tion vi elŝaltis kaj detruis! – La edziĝpropono de tiu sendia viro estis por vi pli valora ol la dieca vivo, kiun mi al vi konfidis. Mi sendis al vi kredantojn por vin averti antaŭ tiu viro, kiu vin korpe kaj anime detruis. Sed vi ilin ne aŭskultis. – Vi tre bone konis mian vorton, kiu avertas antaŭ tia ligo de la kredanto kun nekredanto. Ankaŭ via konscienco vin admonis. Sed ĉio vane, vi faris laŭ via propra kapo kaj ne demandis pri tio, kaj poste iom post iom detruis la diecan semon de mia vorto kaj esto en via brusto. Tiel vi mortigis vin mem kncerne la diecan vivon, pri kiu vi iam antaŭe petegis, kaj kiun mi al vi donis. Vi

propradecide vian diecan vokitecon kaj antaŭdestinecon por tiu kaj la eterna vivo malatentis, eĉ per viaj piedoj surtretis. Tiel la demonaj fortoj ricevis rajton je via korpo kaj spirito kaj rajtis vin turmenti. Tiel vi fariĝis obsedita kaj en tia stato kaj iĝis murdistino en propra familio antaŭ la tuta mondo. – Nun ricevu, kion viaj faroj valoras…“


Denove staras iu viro antaŭ la trono. –

„Via afero estas tre serioza!“ –

„Tre serioza, ĉu? Sed mi ne estis murdinto!“ –

„Ĉu vi opinias, ke ne? Mi volas al vi diri, ke vi estis iu tre malica. Jes, korpojn vi ne mortigis, sed jes la animojn! – Kiomaj animoj estis pro via falsa prediko perditaj! Vi ĉe la pupitro atencis kontraŭ la vereco de la Biblio. Vi prezentis la miraklojn de la Biblio ridindaj. La Filon de Dio vi proklamis simpla ĉarpentisto. La animojn, kiujn vi devus varbi kaj savi, vi konfirmis en ilia senkredo. Vi ŝarĝis vian konsciencon per sangokulpo. Por vi troviĝas nenia senkulpigo, ja vi posedis la Biblion kaj traktis ĝin laŭofice.

Al vi ankaŭ ne mankis atestaĵoj de la vero. En via loko troviĝis komunumo. Sed kontraŭ ĝi vi batalis kaj ilin markis kiel sektanojn. Oni vizitis vin kaj vin petis pripensi ankaŭ la savon de via animo. Vi forsendis malafable la vizitantojn. Vi estis blinda blindulkondukinto. Via respondeco estas giganta. Troviĝas malsupra loko en la infero. Tien venas la murdistoj de la homoj, la animmurdistoj. Tie vi povos alaŭskulti la vekriadon de tiuj, kiuj iris en abismon pro via kulpo…! For de ĉi tie!“ Kaj ĉiam denove venas animoj antaŭ la tronon, tiel senpaŭze. Ĉu iam ankaŭ vi staros inter tiuj, kiuj estos kondamnitaj kiel murdistoj?



*Kun afabla permeso de Missionswerk „Die Wegbereiter“*

# La lasta Dia juĝo

Mi havis sonĝon, la eterna mateno elpaŝis kaj Dio komencas juĝon!
Mi vidis ĉiujn naciojn kunvenintaj – ili staris sub la lumo de eterno!
De la trono venis brilanta anĝelo, li staris sur la tero kaj maro
kaj proklamis kun levita dekstra mano: „For estas la tempo, venu!“ –

Tiam, ah, kia lamentado kaj plorado de la perditoj en aero:
„Montoj kaj holmoj, kovru nin!“ Nun ili preĝas, sed tro malfrue.
Tie staris riĉulo, lia posedo estas for kaj li en mizero.
Anstataŭ memkonscie sin levi – li sian kulpoŝarĝon sentas peza.

Kaj vidu, multaj famuloj sur la tero lasis sian famon post si.
Kaj jen, kie nur Jesuo estas adorata, li sinkis pro hontiĝo sian rigardon!
Multaj vidvinoj staris tie kaj multaj orfoj, Dio aŭdis iliajn petegojn,
Li viŝis iliajn larmojn kaj plenumis iliajn petojn.

Hazardulo staris tie kaj drunkulo, premitaj de angoro en sia konscienco.
Kaj ĉiuj tentantoj al malico – estis sinkigitaj abismen.
Sed vidu: ho, kia mirindo! Neniu tion povas komplete priskribi:
milionoj, senkalkuleble, kunvenintaj – ili jen staras en brilo ĉiela!

Sian tutan plagon supervenkintaj – la vestoj en sango lavitaj,
en buŝo ilia nenia mensogo trovita – por ili jen bona eterno!
Kaj nun, kia jubilo kaj ĝoja ĝemado de la savitoj aŭdiĝas –
tra sango la venko aperis, de la Savanto ili kronon ricevis!

Laŭdo eterna, adoro – de tiaj, kiuj Jesuon elektis!
Laŭ maniero ĉiela kantantaj. Koro tre kara, ĉu vi inter ili troviĝas?

*Aŭtoro nekonata*

# Dio ilin vestis!

*Elplume de d-rino Gertrud Wasserzug*

Oni devas rimarki, ke Dio, la saĝa Kreinto, ĉiun el siaj vivkreitaĵoj vestis, ke ili estas protektataj kaj provizataj por la vivo ĝuste tie, kie ili estas enhejmigitaj. Nur la homo naskiĝas nuda kaj senvesta kaj bezonas veston, kiu lin protektas kontraŭ la malvarmo kaj varmego.

Kial Dio ĝuste por la homo, sian plej altan kreitaĵon, tiel malmulte preparis? Tio estas pravigita demando – kaj la respondo troviĝas en la Biblio, la vorto de Dio.

La unuaj du homoj, Adam kaj Eva, estis perfektaj kaj venis el la Dia mano sen iu ajn peko. La esprimo de tiu interna sankteco estis ilia ekscelento! La Biblio parolas pri la apero de Dio kaj diras: „Vi, kiu estas ĉirkaŭkovrita de lumo kiel de vesto“ (Psa 104,2a). Tiel estis ankaŭ ĉe la unuaj du homoj: ili estis kovritaj per la ekscelento de Dio.

Sed poste venis la peko en la koron de la homoj. Ili apartiĝis de Dio kaj alaŭskultis la diablon. En la sama momento la ekscelento de ilia esto malaperis kaj per tio ankaŭ la ekscelento de ilia vesto. Sub hororo ili rimarkis esti nudaj kaj ricevis hontosenton. Ili volis sin kovri mem, ja en la Biblio estas skribite: „… kaj ili kunkudris foliojn de figarbo kaj faris al si zonaĵojn“ (1 Mos 3,7). Sed tiu vesto-peco ilian nudon ne povis kovri, la ekscelenton de la vesto de la ekscelento de Dio ne povis anstataŭi.

Kaj nun kompatis Dio super ambaŭ pekohavaj homoj kaj oni legas: „Kaj Dio la Eternulo faris por Adam kaj por lia edzino vestojn el felo, kaj Li vestis ilin“ (1 Mos 3,21). Tiujn vestojn devis du bestoj pagi per sia vivo; ilia sango estis verŝita por povi la homojn vesti. Per tiu unua vesto por ambaŭ homoj Dio mem donis mirindan antaŭikonon por la sinofero de Jesuo Kristo por la pekoj de la mondo. Tie, sur Golgoto Dio preparis novan veston de justeco de Jesuo Kristo por la pekuloj, kaj Li vestas ĉiun, kiu en Jesuon kredas, per tiu vesto de Jesuo Kristo, ke tio nin ĉiujn pravigas je komuneco kun Dio.

La peko faris la homon nuda kaj senvesta. Sed Dio vestis la homon. Li ne volas havi la homon nuda. Li volas, ke la homo sin kovru.

Sed la diablo senvestigas la homon, li volas pere de la nudo veki la pasion de la karno kaj provoki la homon por fari pekojn.

Kie ajn iu homo sin turnas al Dio, li konas la volon de Dio, kiu lin volas vesti. Tuj kiam la idolanoj estis tuŝitaj de la evangelio, ili ricevas emon sin vesti.

Sed ju pli la kristanoj sin de Dio forigas, tiom pli ili alaŭskultas la voĉon de la diablo, kiu la homon volas senvestigi.

Niatempe la modo orientiĝas laŭ sia negoca maniero laŭ la pasioj de la karno de la pekanta homo, tial tiu modo lin senvestigas. Jes, ĝi uzas la veston, kiu verdire devus kovri la nudecon de la homo, ĝuste por ties nudecon elmontri. La triumfo de la modo estas la nudeco de la virino, tiel ke ŝi povus iĝi la kaptilo por la peko.

La historio nin instruas, ke certa popolo ĉiam sin direktis en abismon, kiam la virinoj ene de ĝi publike senvestiĝas kaj ili trovas plaĉon en viraj vestoj. La Biblio por ĉiuj tempoj baze diras: „Ne devas esti apartenaĵo de viro sur virino, kaj viro ne surmetu sur sin veston de virino; ĉar abomenaĵo por la Eternulo, via Dio, estas ĉiu, kiu faras tion" (5 Mos 22,5). Legu pri tio ankaŭ ĉe 1 Tim 2,9 kaj 1 Petro 3,3-5. Pri la laŭbiblia hararanĝo de la virino legu 1 Korintanoj 11,1-16.

Se oni vidas la nunan virinan mondon en ilia moderna senvestiĝo, ni jam povas senti abomenon kun la pripenso pri la juĝo de Dio. Kiom da virinoj kaj filinoj permesas sin blindigi fare de la modo, forĵeti la mezurojn de Dio el la Biblio koncerne la vestojn kaj hararanĝon kaj faras la samon kiel ĉiuj aliaj faras – kaj ili ne rimarkas, ke ili tiel fariĝis instrumentoj de la peko kaj la sklavinoj de Satano.

Lasu nin finfine veki kaj starigi la volon de Dio super la volon de la modo!

Ankaŭ por la moderna tempo validas: Dio ilin vestis – sed la diablo ilin senvestigis! Decidu, al kiu vi volas aparteni! Vi difinas la komencon de la vojo, sed ĝian finon difinas Dio.

# Tatuado kaj trapika metalornamado (*piercing*) – ĉu senkulpa modo de junularo?

*Elplume de la evangeliisto Alexander Seibel, Schöffengrund*

Troviĝas supozo, ke pli ol tri milionoj da germanoj estas tatuitaj, kun kreskanta tendenco. La simboloj varias milope, ek de serpentoj, feinoj, mortkranioj ĝis floroj. Tiuj tatuaĵoj estas aparte serĉataj de junaj personoj. Tiel tekstas en iu taggazeto jam en la jaro 1996 sub la titolo „Bildoj, kiuj iras subhaŭten“ sekve: „La entuziasmuloj de la korpa kulto en 2000 tatuaj laborejoj serĉas novajn edifojn, la novan provokmomenton. Permesita estas ĉio, kio plaĉas: pentrado sur la korpo, nazringoj, trapikaj metalornamaĵoj sur ĉiuj korpopartoj.“

Samtempe oni proponas pli kaj pli da bizaraj formoj, kiuj parte ankaŭ kaŭzas dolorojn. Nova en la tendenco estas „branding“ (enbruligo), kie la „viktimo“ devas multon elteni, se la sigelilo, varmigita ĝis 1000 ˚C estas premita sur ilian haŭton. Por ankoraŭ pli eltenkapablaj uloj troviĝas „tuckering“ (instalo de metalpecoj per traboro de la haŭto). La rezulto: kio antaŭe validis kiel puno, humiligo, misformado aŭ sigelado de la sklavoj, tio validas nuntempe kiel „cool“ (impone) kaj trovas pli kaj pli da adeptoj. Tiel denove legiĝas en iu gazeto pri la temo „piercing“: „Ringo tra la nazo, la umbiliko aŭ en la intima regiono estas „in“ (aktuala).“

Ringoj en oreloj de junaj viroj estas ankaŭ pli kaj pli postulataj. Intertempe tio fariĝis vera modo de adoleskuloj. Sed la afero fariĝas pridubinda, kiam ankaŭ la piaj gejunuloj sin tiamaniere elmontras; antaŭ ĉio sur la fono, ke la unuaj viroj, kiuj per tiaj „ornamaĵoj“ en oreloj aperis en la 60-aj jaroj, estis la homseksuloj, tio estis ilia rekona signo. Kompreneble la kredantaj adoleskuloj ne pensas pri tio kaj nuntempe tio ne havas plu tiun signifon. Sed ĉu oni povas la radikojn de certa evoluo plene ignori?

Ringoj en oreloj kaj ankaŭ tra la nazo ĉe la izraela virino validis kontraŭe, laŭ la Biblio, kiel ornamo (Jeĥ 16,12), kaj aparte la nazringo kiel simbolo de subiĝo de la virino sub la aŭtoritaton de ŝia edzo resp. alia viro (1 Mos 24,47). Tiun ĉi bildon la Biblio utiligas poste ankaŭ ĉe aliaj lokoj kiel simbolon por juĝo, en tiu kazo super la armeo de la asiranoj: „Pro tio, ke vi koleris kontraŭ Mi kaj via aroganteco venis al Miaj oreloj, Mi metos Mian ringon en viajn naztruojn kaj Mian buŝbridaĵon en vian buŝon, kaj Mi reirigos vin per la sama vojo, per kiu vi venis“ (2 Reĝ 19,28; Jes 37,29).

En la tempo de la Malnova Testamento al la sklavo, kiu volis resti ĉe sia mastro, estis lia orelo penetrita kiel la signo de la propravola subiĝo „kaj li estu sklavo por ĉiam“ (2 Mos 21,6 kaj 5 Mos 15,17).

Ĉu mi rajtas ĉi tie desegni paralelon, nenian dogmecan eldiron? Ĉu eble ĉio-ĉi estas la signo, ke oni volas konscie aŭ senkonscie subiĝi al iu por disponigi sin al tiu kiel sklavo? La Biblio parolas pri tio, ke troviĝas nevidebla sklavposedanto, kiu la homojn per pekoj ligas al si, kaj la Skribo nomas lin „dio de tiu epoko“ (Joh 8,34 kaj 2 Kor 4,4).

La fakuloj de la afero nomas la 90-ajn jarojn la jarcenton de la homseksualeco. Probable la sekvaj ekleziaj historiistoj nian jarcenton nomos per tio, ke en ĝi la (okcidenta) kristana mondo la plej rapida el ĉiuj asimiliĝos al la tempospirito.

La tatuado estis antaŭe la marko de la suba kaj duonsuba mondo kaj estis preferita ĉe la prizonuloj. Tiuj praktikoj divenas el la naturpopoloj, kiuj antaŭ ĉio el religiaj kaj kultaj motivoj sian haŭton tiel desegnis.

Ene de la Dia vorto la engravurado aŭ entranĉado de la haŭto estis certaaspekte prezentita kiel la antaŭfenomeno de la nun rafinitaj teknikoj kaj praktikoj kaj estis definitive malpermesataj (3 Mos 19,28; 21,5) aŭ: „Vi estas filoj de la Eternulo, via Dio: ne faru sur vi entranĉojn, kaj ne faru senharaĵon super viaj okuloj pro mortinto“ (5 Mos 14,1).

Tiaj manipuladoj estis en la idolana mondo kutimaj en ligo kun funebrado post mortinto. La avertoj de la Skribaĵo ne estas senbazaj, kvankam la Biblio ne donas pli profundan klarigon por tia malpermeso. La komentistoj super tiuj moseaj lokoj tamen troviĝas en relative alta interkonsento per siaj interpretadoj. La „Wycliff Bible Commentary“ diras pri la ordono en 3 Mos 19,28: „Tio malpermesis iun ajn propravolan difektadon de la persono. Tiel la entranĉoj kiel la tatuado de la korpo estis praktikitaj fare de la idolanoj (p. 101).

Alia komentario diras pri la sama biblia loko: „La praktiko, provizi sin per entranĉoj en vizaĝo, sur brakoj kaj gamboj kiel esprimo de funebro, estis inter la idolanoj amase disvastigitaj. Tio validis kiel signo de respekto antaŭ la mortinto, kaj same kiel la repaciĝa ofero por la diaĵoj, regintaj super la morto. La judoj lernis tiujn kutimojn en Egiptio kaj troviĝis en danĝero en tiajn kultojn denove fali (Jer 16,6; 47,5). Tatuaĵoj estis ankaŭ ligitaj kun la nomoj de la demonoj kaj estis daŭra signo de la defalo resp. de la ribelo.“

Mi ne povas prijuĝi, ĉu oni tiajn eldirojn en la sama akreco povas apliki. Tamen oni devus pripensi, ke la modo de tatuado iras paralele kun la reviviĝo de la idolanaj, esoteraj fluoj. Tiel estas signigodone, ke la Biblio parolas pri tiuj praktikoj en kuneco kun la juĝo de Dio super la popoloj (Jer 41,5; 48,37). Pro tio la kristanoj devus rezigni pri iu ajn maniero sin tatui. Tiel iu informbulteno pri la sama

temo skribas: „La animprizorgantoj scias raporti, ke homoj kun tatuaĵoj, kiuj poste trovas Kriston, ĉiam ‚instinkte' sentas, ke iliaj haŭtikonoj ne konvenas por ilia nova stato de Diaj infanoj."

Lige kun 5 Moseo 14,1 la sama komentariisto skribas: „Kvankam tiuj manipuladoj povas laŭ si mem ŝajni senkulpaj, ili tamen estis ligitaj kun la praktikoj kaj kredimagoj, kiuj antaŭ Dio estis abomenaĵo."

La tranĉojn en la haŭton por stimuli la religian vervon donas 1 Reĝ 18,28. Tiu ĉi versiklo parolas pri tio, kiel la sacerdotoj de Baal dancis ĉirkaŭ lia altaro kaj sin tranĉis en la karnon, ĝis ili verŝis sangon kaj falis en ekstazon. La „Wyclif Bible Commentary" rimarkigas pri la tekniko atingi pere de la danco spiritan „kleriĝon": „Tiaj praktikoj ankaŭ en nia tempo ne estas nekonataj ĉe certaj dancantaj dervIŝoj" (ibid, p. 333).

Kelk-iu „kristana" festivalo resp. junulara renkontiĝo memorigas per mirigaj detaloj, koncerne la korpomoviĝojn, je tia prezentiĝo de la sacerdotoj de Baal, kie oni laŭ la pratempaj idolanaj metodoj provas konstrui transformitan konscistaton. La per tio ligita drogaĉsimila feliĉigo kutimas esti rigardata kiel efiko de la Sankta Spirito, ja, tiel argimentite, „temis pri kristana koncerto, kiun oni frekventis". Ĉe la averto de Paŭlo en 1 Kor 10,7 la Biblio mencias inter alio, kiel la popolo „ludis". La en la greka lingvo uzita verbo „paizo" laŭvorte signifas konduti kiel infano kaj povas esti tradukata per: „salteti, danci".

Ankoraŭ unu hororiga penso sin proponas. En la libro Apokalipso, ĉap. 13 troviĝas la fama profetaĵo, kiel fine de la tagoj ĉiu devos alpreni la nombron de la kontraŭdira besto. Do okazos iaspeca „globala tatuado" respektive „amasa pirsingo" aŭ kiel ajn la markado de la homoj okazos. Laŭ la momenta stato de evoluo oni havas impreson, ke ĉe tiu generacio kontraŭ tia „signado" troviĝos ĉiam malpli da rezervo.

# Ne peku!

*Elplume de Lothar Gassmann, Pforzheim*



1 Johano 2, 1-17:
**1 Infanetoj miaj, ĉi tion mi skribas al vi, por ke vi ne peku. Kaj se iu pekas,
ni havas Advokaton ĉe la Patro, Jesuon Kriston, la justan; 2 kaj li estas repa-
cigo pro niaj pekoj, kaj ne sole pro niaj, sed ankaŭ pro la tuta mondo.**
**3 Kaj per ĉi tio ni scias, ke ni konas lin: se ni observas liajn ordonojn. 4 Kiu
diras: Mi lin konas, kaj ne observas liajn ordonojn, tiu estas mensoganto, kaj
la vero ne estas en li; 5 sed en ĉiu ajn, kiu observas lian vorton, vere perfek-
tiĝis la amo al Dio. Per ĉi tio ni scias, ke ni estas en li: 6 kiu diras, ke li restas
en li, tiu mem devus tiel iradi, kiel li iradis.**
**7 Amataj, al vi mi skribas ne ordonon novan, sed malnovan ordonon, kiun
vi havis de la komenco; la malnova ordono estas la vorto, kiun vi aŭdis. 8
Ankaŭ mi skribas al vi novan ordonon, kiu estas vera en li kaj en vi; ĉar la
mallumo forpasas, kaj la vera lumo jam brilas.**
**9 Kiu diras, ke li estas en la lumo, kaj malamas sian fraton, tiu estas en la
mallumo ankoraŭ ĝis nun. 10 Kiu amas sian fraton, tiu restas en la lumo, kaj
en li ne estas faligaĵo. 11 Sed kiu malamas sian fraton, tiu estas en mallumo,**

**kaj iras en la mallumo, kaj ne scias, kein li iras, ĉar la mallumo blindigis al li la okulojn.**

**12 Mi skribas al vi, infanetoj, ĉar la pekoj al vi estas pardonitaj pro lia nomo. 13 Mi skribas al vi, patroj, ĉar vi konas tiun, kiu estas de la komenco. Mi skribas al vi, junuloj, ĉar vi venkis la malbonulon. Mi skribis al vi, infanoj, ĉar vi konas la Patron. 14 Mi skribis al vi patroj, ĉar vi konas tiun, kiu estas de la komenco. Mi skribis al vi, junuloj, ĉar vi estas fortaj, kaj la vorto de Dio restas en vi, kaj vi venkis la malbonulon.**

**15 Ne amu la mondon, nek la mondaĵojn. Se iu amas la mondon, la amo al Patro ne estas en li. 16 Ĉar ĉio, kio estas en la mondo, la dezirego de la karno kaj la dezirego de la okuloj kaj la fiereco de vivo, estas ne de la Patro, sed de la mondo. 17 Kaj forpasas la mondo kaj ĝia dezirego; sed la plenumanto de la volo de Dio restas por eterne.**

## Kio la peko estas?

La plimulto da nuntempaj homoj la nocion *peko* apenaŭ povas kompreni kaj utiligi. En tiu ĉi vorto troviĝas interligo kun separiĝo kaj apartiĝo. En tiu senco la vorto peko signifas esti separita de la Kreinto, de Jesuo Kristo, de la Savinto – voli vivi sen Dio. En la greka lingvo troviĝas por tio diversaj nocioj. Unu el ili aludas al la mistrafo de la celo, transpaŝo de la ordono de Dio kaj tiel Dio de tia homo ne ricevas la al Li konvenan honoron. Tiu greka signifo estas ĉi tie multe pli ampleksa ol la esperanta aŭ germana.

Se oni aldone observas la averton sublume de la historio de savo, la peko komenciĝas jam en la Paradizo, kiam niaj pragepatroj Adam kaj Eva volis mem esti kiel Dio kaj konsekvence transpaŝis la bonan ordonon de Dio, por ne manĝi de la arbo de rekono. Ili volis manipuli super la Dia rekono kaj estis de la serpento (Satano) devojigitaj kaj trompitaj. Adam kaj Eva volis propraaranĝe atingi la eternan vivon, sen ke ĝi estu donaco de la eterna vivo, kiun Dio al ili de la tuta komenco promesis.

Sed nur pere de Jesuo Kristo ni povas tiun vivon atingi. Sed ili agis arbitre, surbaze de la sugestoj de la serpento, kaj ili forlasis la ordonon de Dio, kiam ili volis esti kiel Dio. Iliaj okuloj devus esti malfermitaj, kaj la eterna vivo devus esti al ili donita – sinstarigo kontraŭ Dio, volo esti kiel Dio, orgojlo, fierego, falo sur la teran nivelon, ĉio-ĉi rilatas kun la peko (1 Moseo 3,1-5).

Tiu prapeko de niaj pragepatroj estis daŭre heredita tra la tuta historio de la homaro, kiam ĉiu homo laŭ sia naturo estis koncipita kiel pekulo kaj tiel naskita (psalmo 51,7; Romanoj 3). Aparte la homo, kiu sin vidas kaj prenas kiel sufiĉe bona, kaj tiel ne bezonas Savanton, faras tiel la prapekon, malakceptante Dion, vivante tiel praktikan ateismon.

En la epistolo al Galatoj 5,19-21 troviĝas vera katalogo de unuopaj pekoj, surlistigitaj kiel la *faroj de la karno*, kiuj senescepte estas la konsekvencoj de la memadorado:

Galatoj 5,19-21: **19 Evidentaj estas la faroj de la karno, kiuj estas malĉasteco, malpureco, voluptemo, 20 idolkulto, sorĉado, malamikeco, malpaco, ĵaluzoj, koleregoj, partiemeco, skismoj, herezoj, 21 envioj, ebrieco, diboĉado, kaj aliaj similaj; pri kiuj mi avertas vin, kiel mi jam antaŭe admonis vin, ke tiuj, kiuj tion faradas, ne heredos la regnon de Dio.**

Tio nin ekskluzivas el la regno de Dio, se ni en tiuj ĉi pekoj obstinas kaj ne faras penton. Kaj tiel troviĝas nur *unu* vojo al la ĉiela Patro: Jesuo Kristo, kiu al ni nian kulpon pardonas, se ni ĝin konfesas kaj sincere bedaŭras.

Galatoj 5,22-23: **Sed la frukto de la Spirito estas amo, ĝojo, paco, pacienco, komplezo, bonkoreco, fideleco, mildeco, sinregado; kontraŭ tiaj ne ekzistas leĝo.**

La peko estas detrua kaj nuliga kaj ekskluzivas la homon el la savo de Dio. Tiom malpli iu ajn homo estas sen peko. Ni ĉiuj bezonas purigon per la sango de Jesuo, kiel ni en la ĉapitro 1 jam vidis.

## Ni ne devus peki

1 Johano 2, versiklo 1:

**Infanetoj miaj, ĉi tion mi skribas al vi, por ke vi ne peku!**

La vortoj de la apostolo Johano estis skribitaj, po ke la ricevantoj de liaj versikloj ne peku. Ankaŭ pri la pardono de la kulpo estas parolo kun la celpunkto de malpermeso peki. Kelkaj homoj opinias, ke ili tiel kaj tiel ricevis la nerevokeblan pardonon de Dio, ke tiel ilia konduto ne estas tiel malbona.

Kun simile miskomprenebla temo renkontiĝas la leganto en la epistolo al Romanoj, kiam apostolo Paŭlo eldiras la retorikan demandon, ĉu do oni peku, se la graco estas garantiita kaj tiom pli forta ol la grandeco de la kulpo. Tio neniel estas la kazo, diras la respondo! La peko  volas nin peli en malesperiĝon, volata de Dio. En tiu senco, nome, ke la homo, kiu ne vidas plu por si perspektivon, konvertiĝas kaj rekonas, ke li el propra forto al Li ne povas plaĉi.

Ni bezonas helpon de nia Savanto Jesuo Kristo. Li volas nin certe provizi per sufiĉa forto por vivi kun Li pere de sia Spirito, kiu loĝas en la fido – por ke la infano de Dio ne estu ludpilko de la mondo kaj de la pekoj, sed ebligas kontraŭstari malbonon per la forto de la Dia Spirito. Tamen tio signifas, ke ni neniam sur la tero en nia nuna korpo povus atingi la staton de senpekeco.

Tio estus memtrompo, kiun la Biblio funde demaskigas. Tiel restas la tensio, en kiu ĉiu kredanta kristano staras, insistas.

En la 1-a epistolo de Johano oni legas eksplicite pri la sendubaj kaj penetrantaj

vortoj al la legantoj de ĉiuj tempoj.

## Kiu restas en Kristo, tiu ne povas peki

… ja Kristo en ni ne povas peki.

Sed tuj, kiam oni de li malproksimiĝas, oni falas en la povoregionon de Satano kaj tiel certe subiĝas al la nin kateniganta peko.

Tiu batalo inter la spirito kaj la karno estas nia destino, kiom longe ni vivas en nia tera korpo. Paŭlo skribas en la 7-a ĉapitro de sia epistolo al Romanoj, en la versikloj 19-21, ke li ne faras la bonon, kiun li fari volas, sed la malbonon, kiun li fari ne volas.

Kelkaj homoj pensas, ke ĉi tie estas eldirita pozicio *antaŭ* la konvertiĝo, sed mi pensas kiel multaj aliaj eksegeziistoj, ke apostolo Paŭlo skribas pri si mem en la stato de novnaskiĝo, ĉar li precize kiel senescepte ĉiu alia homo (escepte de Kristo) ne estas senpeka.

Ankaŭ Johano parolas en la 1-a ĉapitro, versikloj 8-10, pri si mem, kiam li skribas, ke ni nin mem trompus, se ni asertus, ne plu peki.

Kiel la konvertiĝinta kaj nve naskita apostolo skribas Johano samtiel pri si mem:

**Se ni diras, ke pekon ni ne havas, ni nin trompas, kaj la vero ne estas en ni (**1 Johano 1,8).

Do ni ne devus peki. Sed kiam tio okazas, Sinjoro Jesuo en certa senco enpaŝas kiel advokato kontraŭ la akuzanto de la fratoj, kiu nin ĉe Dio akuzadas.

## La akuzanto kaj la advokato

Satano estas super ĉio insida, ja unue li la homon tentas kaj poste li lin akuzas, kiam la homo liajn sufloradojn postsekvis. Tio faras la diablecon entute. La greka vorto *diabolos* signifas inversiganto, turnanto, kaj alia greka vorto *satanas* devenanta el la hebrea *ha-satan*, signifas la akuzanton aŭ la kontraŭanton. Aldonaj nomoj de tiu sama persono estas: Serpento, Drako kaj Lucifero (Lumportanto). Li defalis de Dio kaj nun li provas ankaŭ la homon kuntreni al la sama kontraŭstaro kontraŭ la vivanta Dio. Sed ni havas la advokaton ĉe la Patro: nian Sinjoron Jesuon Kriston. Tiu ĉi nomo signifas: Savanto, Mesio, Savreĝo. Jesuo Kristo estas tiu, kiu sidas sur la venka trono, kiu dum la miljara regno el Jerusalemo regos kaj kiu poreterne sidas dekstraflanke de Dio, sia Patro. Li regos ankaŭ super ni, sia sange deaĉetita grego, super la konvertiĝontaj el Izraelo kaj el la nacioj.

Nun mi volas proponi pri la temo *Ne peku!* praktikajn argumentojn kaj helpon, kial ni ne devus peki.

**20 kialoj, kial oni devus la pekon malami kaj ĝin ne fari.**
(laŭ iu traktaĵo, kun komplementoj de la aŭtoro)

*1. La peko evoluigas propran dinamikon.*
Tiel iomete da pekado kondukas al ĉiam pli da pekado. Se oni iam komencis mensogi, oni devas tion kontinui por sian mensogadon kamufli. Infano diras: „Maĉjo forprenis de mi mian ludaŭteton.“ Tio ne estas vera, la infano perdis ĝin mem, sed li tion ne volas agnoski. Poste tio kreskas. Maĉjo estas pridemandita kaj li elpensas ion novan. Multaj similaj ekzemploj venas ankaŭ el la mondo de plenkreskuloj, kie la mensogo, foje komencita, devas kontinui kaj kreski.
Ankaŭ en la kazo de la reĝo Davido oni povas detekti la saman principon. Unue li postsekvis sian volupton en la okuloj, kiam li vidis la fremdan edzinon Batŝeba sur la tegmenta plato okaze de banado. Li sentis enuon – kaj nenionfaro estas, kiel konate, komenco de ĉiuj transpaŝoj. Tiel li pigriĝis, sendis siajn subulojn militi kaj poste okazis malĉastaĵo kun Batŝeba. Sekvis la murdo de Uria por tiel kamufli la malĉastaĵon. Kaj finfine venis Natano, la profeto, kiu al la reĝo Davido lian kulpon prezentis.
Tiel unu peko kreskis el la alia.

*2. La peko provokas la punon fare de Dio.*
Dio estas justa, Li ne povas kulpon kaj maljustaĵon tiel simple toleri. Pro tio la homo devus havi fundamentitan timon antaŭ la juĝo de Dio super ĉiu peko.
Dio estas amo, sed ĝuste ĉar Li estas amo, Li juĝos per justeco kaj Li la kulpon punos. En la ĉielo troviĝos neniu peko, sed nur la pravigitaj pekantoj tie troviĝos.

*3. La tempo, uzita por peki, estas por ĉiam perdita.*
Tio estas la forĵetita tempo, kiun oni neniam plu povas rericevi kaj kiu postlasas abomenan aromon. Pli poste oni deziras por si tiun tempon pli bone povi utiligi kaj prefere servi la Sinjoron.

*4. Al Dio la peko neniam plaĉas, Li malamas ĝin.*
Dio amas la homon kun sia plena amo, tamen Li devas la malpenteman pekanton refuti kaj lin kontraŭstari.

*5. La peko signifas ŝarĝon sur la dorso de eventuala animprizorganto.*

*6. La peko faras la koron trista kaj malfaciligas la iradon kun Dio.*

*7. La familio kaj la ĉirkaŭmondo suferas sub la sekvoj de la peko.*
Tiel ekzemple, se temas pri la drogaĉa aŭ alia dependeco.

*8. La kunkristanoj suferas sub tio, la persona peko koncernas la tutan komunumon.*

*9. La peko ebligas la malamikojn de Dio triumfi.*
La pekanto ridindigas sin antaŭ la senkreda mondo kaj rikoltas primokon kaj priridon.
.
*10. La peko trompas la pekulon.*
Ĝi metas la homon en iluzion de profito, dum li en vero multon perdas. Satano estas trompanto kaj mensoganto kaj parolas al la homoj ĉiaspecajn allogaĵojn.

*11. La peko malkvalifikas la homon por la spiritaj taskoj.*
La blokiĝo de nekonfesata kulpo malebligas la servon.

*12. La peko estas momenta „distro", kompare kun la poreterna pereo, kiu el ĝi sekvas, se la peko ne estas bedaŭrata kaj ĉesata.*
Mallonga ĝuo – poreterna sufero.

*13. Mia peko povas influi aliajn homojn, ke ankaŭ ili pekas.*
En tiu momento ĉiu estas malbona modelo. Iu, nomanta sin kristano kaj estas kaptita ĉe la ŝtelado en vendejo aŭ dum enrompo, ne estas kristano.

*14. La propra peko povas aliajn bari la Sinjoron Jesuon postsekvi.*
Tiel oni fariĝas malhelpilo, eventuale ankaŭ por la infanoj aŭ por la najbaroj, se oni kun ili daŭre havas kverelojn.

*15. La peko ŝajnigas la krucon facila.*
Jesuo mortis por transpreni la pekon de la homoj kaj li tie por ni sangoverŝis. Sed la „malmultekosta graco" ne prenas la oferon de nia Savanto en adekvata dimensio.

*16. Estas neeble peki kaj samtempe postsekvi Dion kun plena koro.*
La peko signifas baze blokiĝon en onia kredvivo. Tiom longe, ĝis tio ne estas forigita, la postsekvado estas malhelpata. Simile al motoro, en kiu troviĝas ĝenaĵo kaj io troviĝas inter la dentoradoj – tiel ankaŭ en la peko troviĝanta homo perdas la plenan komision de Dio.

*17. Dio ne elaŭdas la preĝojn de la homoj, kiuj ne ĉesas peki.*
Sendube rajtas pekanto preĝi al Dio por pardono de sia kulpo, sed se tiu homo daŭre konscie vivas en sia peko, apenaŭ povus troviĝi fruktodona preĝvivo. La pekoj apartigas la homon disde la Dio.

*18. La peko detruas la renomon de la homo kaj prirabas ties fortojn por esti aŭtenta*

*atestanto de Jesuo.*

Vivo en la peko estas honto por la homo mem kaj sekve ankaŭ por lia familio kaj komunumo.

*19. Peki signifas, ne ami Jesuon Kriston.*

*Kion Jesuo estus pri tio diranta?* – Jen tiu ĉi simpla meditreflekto povus foje helpi trafi pli bonajn decidojn. Ankaŭ okaze de misaj pensoj oni devas atenti, ke oni ilin ne invitu en sian internon, ke ili tiel povus iĝi detrua potencialo.

*20. La nepardonita peko ekskluzivas la homon de la ĉielo kaj kondukas en la inferon.*

La apostolo Johano skribas en la unua versiklo de sia alparolo laŭ tre fajna maniero pri tiu ĉi temo. Konvena kaj memkomprenebla kondutmaniero rilate la sanktan Dion estas, ne plu pekadi. Samtempe sur la tero neniam oni sukcesos absolute ne plu iĝi kulpa. Tamen la serioza postsekvanto antaŭ la peko prefere *fuĝas,* ol tio okazas per malrapida sindispona glito de ties spirita vivo. Por ne paroli pri la eksplicita enkalkulado de la peko.

Vers. 1b) **Kaj se iu pekas, ni havas Advokaton ĉe la Patro, Jesuon Kriston, la justan.**

Denove okazos, ke oni pekos, kaj pro tio la averto kaj la konsolo apartenas senpere unu al la alia. La porparolisto aŭ la kuratoro signifas ankaŭ: advokato, la atestanto, tiu, kiu por ni pledas, eĉ kun sia vivo.

Tiu ĉi porparolisto, estante justa, petas antaŭ la Patro por ni. Li estas objektiva per sia juĝo kaj justa, ĉar li al ni donacas sian justecon kaj nin vestas per sia pura vesto. Puran veston ni de li ricevas – mirinde!

Li, Sinjoro Jesuo, estas la nura, kiu estas justa kaj nin povas antaŭ Dio, sia Patro, pravigi. Kaj el tiu pravigo kreskas la sanktigo.

Sanktigita (separita) estas ĉiu, kiu estas purigita per la sango de Jesuo kaj vivas en postsekvado de Kristo. Pro tio la pravigo el la graco kaj la sanktigo de iu homo neniam estas disigebla, sed ili ambaŭ restas dumviva, reciproke efikanta proceso.

Vers. 2**: Kaj li estas repacigo pro niaj pekoj, kaj ne sole pro niaj, sed ankaŭ pro la tuta mondo.**

Jesuo Kristo proponis sin mem anstataŭe por la homoj, ŝarĝitaj per kulpo kiel repacigo. Li plenumis la oferon de la Malnova Testamento kaj ĝin tiel por ĉiam kompletigis. Li unufoje por ĉiam donis la plenvaloran oferon (Hebreoj, ĉap. 9).

Tamen oni la eldirojn ne rajtas kompreni tiel, ke la tuta mondo nepre estus repacigita kun Dio, sed estas skribite en 2 Korintanoj 5,20:

**Ni do estas ambasadoroj pro Kristo, kvazaŭ Dio per ni petadus; ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio!**

La repaciĝo cetere estas al ĉiu homo proponita, sed ĝi devas esti akceptita, por havi efikon. Pro tio tiu ĉi alvoko de Paŭlo estas tute adresita al la homoj de ĉiuj tempoj.

Se iu la inviton de Dio malakceptas, neniu estos devigata akcepti la savon. Tiu ĉi alvoko hodiaŭ adresiĝas ankaŭ al vi, kara leganto. Ni ne devas trovi finon en poreterna malsavo, sed rajtas havi aliron al la ĉiela regno.

Vers. 3: **Kaj per ĉi tio ni scias, ke ni konas lin: se ni observas liajn ordonojn.**

La misinstruo de la gnozo, kiu ankaŭ niatage troviĝas enkadre de spiritismo kaj okultismo, instruas la supernaturan rekonkapablon. Pri tio la adeptoj de la esotero fieras kaj rigardas super la homoj, kredantaj en Kriston kiel la supoze sciantaj sur la nesciantajn. Se oni tiamaniere rigardas super la aliajn, tiam oni transpaŝas la ordonon de la amo kaj vivas en fiero kaj orgojlo.

Ni kontraŭe atentas, ke ni Dion vere konas, se ni kun Li havas komunecon. Kaj tio vere ne estas afero, komprenenda intelektule, sed temas pri tio, vivi en persona unueco kun Dio pere de Kristo. Ĉi tie oni ne parolas pri mistika kunfandiĝo laŭ la maniero, ke en ni mem la dieca kerno troviĝus. Ne, la ligo kun Dio estas donacita komuneco, alprenita per la fido. Ni neniam troviĝos sur la sama nivelo kun Dio. Tamen se Kristo en certa homo loĝas, tiam li estas pridonacita per lia Spirito, sendube de tiu ankaŭ dependa de tio, kiugrade la kristano vivas kiel la kunkrucumita. La observado de la ordonoj de Dio estas la natura sekvo de la savita vivo en Kristo.

Por eviti la miskomprenon pri la ŝajna kontraŭdiro inter la ordono de Dio, observi la ordonojn, kaj tamen kredi en Lian senkondiĉan amon, ni legu en la epistolo al Romanoj 13,8-10:

**Al neniu ŝuldu ion, krom la reciproka amo; ĉar amante sian proksimulon, oni plenumis la ceteran leĝon. Ĉar tio: Ne adultu, Ne mortigu, Ne ŝtelu, Ne deziru, kaj ĉiu alia ordono, estas resumitaj en la jena parolo: Amu vian proksimulon kiel vin mem. Amo ne faras malbonon al proksimulo; amo do estas la plenumado de la leĝo.**

Kiu Dion amas, observas Liajn ordonojn el dankemo pro la donacita saviteco. La amo estas la plenumiĝo de la leĝo kaj estas konkretigita pere de la observo de la ordonoj de Dio. Sed nur Unu plene plenumis ĉiujn ordonojn: la Sinjoro Jesuo ilin plenumis pere de sia obeemo.

Vers. 4: **Kiu diras: mi lin konas, kaj ne observas liajn ordonojn, tiu estas mensoganto, kaj la vero ne estas en li.**

Tion kompletigas Jesuo Kristo en la evangelio laŭ Mateo 7,21:

**Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo.**

En la teorio kaj kun vortoj oni povas multon aserti. Atestadoj per la buŝo ne savas kaj estas demando, ĉu la kristano fakte *plenumas* la volon de Dio. La ĝenerala volo de Dio estas por ni perita per Lia vorto, pere de dek ordonoj resumita kaj per la prediko sur la monto tre klare formulita. Sed nur aplikante de la komprenito la homo donas veran spiritan frukton. Ĉiuj ordonoj estas resumitaj laŭ Luko 10,27 per la duopa ordono de la amo:

**Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta forto kaj per via tuta menso, kaj vian proksimulon kiel vin mem!**

Ĉi tie la Biblio parolas pri la amo al Dio, amo al la proksimulo kaj amo al la gefratoj.

Vers. 5: **sed en ĉiu ajn, kiu observas lian vorton, vere perfektiĝis la amo al Dio. Per ĉi tio ni scias, ke ni estas en li.**

La amo al Dio kaj proksimulo, la observado de ordonoj kaj la vorto de Dio apartenas nedisigeble unu al la alia. Ni ne devas demeti nur la pekon, sed ankaŭ fari bonon kaj tiel en la potenco de Kristo plenumi la novtestamentan leĝon.

**Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta!** (Mat 5,48).

Tiu ĉi alvoko de Jesuo rilatas al tio, ke ni obeu liajn ordonojn, kio el propraj fortoj ne estas ebla – sed en Jesuo Kristo tio povas sukcesi.

Ĉiam denove temas pri la amo, kiu estas palpebla kaj konkreta nur pere de ago. Dio volas al ni montri la vojon, en kia formo ni helpu al la proksimulo kaj lin subtenu. Tu ĉi malhela mondo estas dediĉita al pereo, sed ni volas sur nia loko esti lumo, kiu indikas al la Patro en la ĉielo. Ni devus vivi tiel, kiel Jesuo Kristo, kiu sian vivon volas realigi en ni.

Vers. 6: **Kiu diras, ke li restas en li, tiu mem devus tiel iradi, kiel li iradis.**

Kiamaniere do la Sinjoro Jesuo vivis? En humileco kaj mildeco, do en kontraŭo kun fiero kaj orgojlo, la praa pekoformo. La sankta kolero, pri kiu ni en la Nova Testamento legas, havas nenion komunan kun la detrua kolero de la homoj, sed servas por tio, ke la homoj forlasu la falsan vojon kaj sin deturnu de ĝi. Ĉu ni ankaŭ estas pretaj, al Dio esti tiamaniere obeemaj kaj laŭ Lia vorto vivi? Kaj nun tio estos ankoraŭ pli precize prezentita:

Vers. 7: **Amataj, al vi mi skribas ne ordonon novan, sed malnovan ordonon, kiun vi havis de la komenco; la malnova ordono estas la vorto, kiun vi aŭdis.**

La „malnova ordono“ estas la amo al proksimulo, kiu ankoraŭfoje konkretiĝas per la amo al gefratoj interne de la komunumo de la Sinjoro. Ni tamen estas kapablaj ‚ami’ la malproksimajn kristanojn, kiujn oni apenaŭ konas persone, sed ami

la najbarojn kaj proksimajn personojn estas multe pli malfacile. En la teorio oni povas aserti kelkion, sed kiel aspektas la afero en la praktiko?

Tiu ĉi ordono estas al la homoj eĉ gravurita en ilian konsciencon laŭ Romanoj ĉapitro 2. Ĉiu ricevis konsciencon de Dio, per kiu oni ekkonas, kio laŭ si mem estas bona kaj kio malbona.

Vers. 8: **Ankaŭ mi skribas al vi novan ordonon, kiu estas vera en li kaj en vi; ĉar la mallumo forpasas, kaj la vera lumo jam brilas.**

Kial la malnova ordono samtempe estas nova? Ĉar ĝi estas plenumita en Jesuo Kristo. La vera lumo de la mondo aperis. Li vivis la amon en perfekto kaj eĉ surkruce li preĝis: „Patro, pardonu al ili, ja ili ne scias, kion ili faras."

Ni ne sukcesas tiun ĉi amon vivi, krom se Kristo ĝin faras en ni. Li siajn malamikojn ne malbenis. Sed malbenitaj iĝas tiuj, kiuj la evangelion pervertigas. Kiel kristanoj ni devus por niaj persekutantoj preĝi, por ke ili sin deturnu kaj ankoraŭ povu esti savitaj.

Ni trovas en la evangelio laŭ Johano en la ĉapitro 13 tiun ĉi novan ordonon. Ni ne povas la epistolojn de Johano distranĉi for de lia evangelio, ja tio faras resumon de tio, kion la Sinjoro Jesuo mem diris.

La evangelio laŭ Johano 13,34-35: **Novan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu alian; kiel mi amis vin, tiel vi ankaŭ amu unu alian. Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia.**

Ĉu ni havas tiun ĉi amon inter la gefratoj? El ni mem tio ne estas ebla, sed la Sinjoro Jesuo tiun amon posedas.

Okaze de kvereloj kaj konfliktoj en la komunumo la trafitaj devus preĝi por tio, ke ili povu interpaciĝi, porokaze helpe de aliaj fratoj. Kun la helpo Dia kaj nia forto la repaciĝo estas ebla, por ke la vera lumo ankaŭ interne de la komunumo povu brili.

Vers. 9: **Kiu diras, ke li estas en la lumo, kaj malamas sian fraton, tiu estas en la mallumo ankoraŭ ĝis nun.**

Kiu estas malrepaciĝema kontraŭ sia frato kaj ne montras pretecon, al li pardoni, vivas en la mallumo. La kulpo troviĝas pliparte je ambaŭ flankoj.

Sed se iu opinias, nenian partoprenon kaj respondecon transpreni estus devo, tiu devus peti la Sinjoron, ke Li traserĉu lian koron.

Kiu siajn kunhomojn malamas, tiu nuligas la atestilon de la fido, ankaŭ rilate al la ekstera mondo.

Vers. 10: **Kiu amas sian fraton, tiu restas en la lumo kaj en li ne estas faligaĵo.**

Ekvivalenta vorto por „falpuŝigaĵo" estas la grekdevena vorto: „skandalon"! La

homo, restanta en la lumo iĝas por neniu skandalaĵo aŭ falpuŝiga ŝtono. Ankaŭ por la ekstere starantaj ne. Kiu vere ekzercas la amon, la atestadon por la ekstera mondo ne misprezentos, sed oni al li fidos, ke li estas aŭtenta kristano, kaj ke li opinias siajn aferojn honeste.

Mi povas kun gaja koro diri, ke mi mem havas neniujn malamikojn, eĉ se kelkaj min povus vidi malamiko. La kristano el si provos en pura rilato vivi kun ĉiuj homoj.

Alia afero estas, kompreneble, la pozicio kun teologiaj kontraŭuloj – en tiu ĉi okazo oni restas malmola. Ni ne povas silenti alfronte de sektoj kaj falsaj instruoj.

Spite tion tiuj erarantaj homoj ne estas miaj personaj kontraŭuloj. Ili tamen estas personoj, kiuj aliajn misgvidas, kaj ni devas antaŭ ili eldiri avertojn. Sed ĉiukaze – personan malamikecon mi havas kun neniu sektano. Baze temas pri instrua konfrontiĝo, sed ne pri la interhoma batalo.

Vers. 11: **Sed kiu malamas sian fraton, tiu estas en la mallumo, kaj iras en mallumo, kaj ne scias, kien li iras, ĉar la mallumo blindigis al li la okulojn.**

Li estas blinda blindulkondukanto, blinda gnostikulo, opinianta ekkoni ĉion, sed en vero li ekkonas nenion. La gnostikuloj devas distingi inter tri specoj de la homoj.

Tute pinte sur la valorskalo de la pneŭmatikuloj, la de spirito plenigitaj, en kiuj la „spirita sparko“ loĝas, kiuj la ekkonon de la supersensa kaj je la dieca pretendas. Ili bezonas nenian kredon, ili laŭdire posedas scion. Ankaŭ niatempe troviĝas ĝuste tiaj gnostikaj direktoj. Tiuj „sciantaj“ rigardas sur la kredantaj kristanoj desupre.

Unu ŝtupon sube staras la psikuloj, kiuj kun sia animo kredas, tio ekzemple estas ni kristanoj. Tio estas la nur-kredantaj, sed ne-sciantaj.

Sube de ili venas la hilikuloj, estante krude materie pensantaj kaj (laŭ tiu instruo) ili veturas en pereon, ĉar ili postsekvas nur sian surteran vivon.

Tie jam la gnostikuloj pensis en la erao de la unua kristana eklezio – kaj jam en la tempo de la apostoloj tia pensmaniero troviĝis.

Ili fondis tiun ĉi ‚tritavolan instruon’: la pneŭmatikuloj, la spirite plenigitaj, la psikuloj, la simplaj kredantoj, la hilikuloj, materie perceptantaj. Kaj ili mem troviĝas, kel ili imagas, sur la plej alta ŝtupo. Sed ĝuste per tio nur la altnaza pensmaniero havis sukceson kaj supervenkon, ĉar ili la kredantajn ne amas, sed rigardas sur ilin desupre. Kontraŭ tiu ideologio kaj ankaŭ kontraŭ tiuj, kiuj niatempe tiamaniere pensas, skribas la apostolo Johano en la versiklo 11. La supoze sciantaj kaj ekkonantaj en vero simple estas blindaj!

Kaj nun la apostolo Johano mem proponas – tute alian! – ‚tritavolan instruon’ pri tri diversaj ŝtupoj de matureco – vere interesa interligo.

Sekve ni distingos inter infanoj, junuloj kaj patroj.

Vers. 12: **Mi skribas al vi, infanetoj, ĉar la pekoj al vi estas pardonitaj pro lia nomo.**

En la versiklo 14 ankoraŭfoje sekvas la nocio „infanoj“. En ambaŭ citaĵoj troviĝas du diversaj nociosignifoj. En la v. 12 staras skribite: *teknia*. Tio signifas: infanetoj. Tiun ĉi alparolon utiligas la apostolo ankaŭ cetere por la tuta komunumo. Tiel en la versiklo 12 ŝajne alparolita estas la komunumo. En la versiklo 14 staras: *paidia* – tio signifas infanoj, kiuj ankoraŭ ne estas maturaj. En la versiklo 12 troviĝas ebleco, ke li alparolas la ankoraŭ junajn, ne jam maturajn kristanojn, aŭ ankaŭ la tutan komunumon. Tion oni povas lasi malfermita.

La komenca motivo de la kredo estas la pardono de la kulpo kaj la instruo pri la bapto.

Koncerne la infanojn poste tekstas: **… ke vi ekkonas la Patron**. Tiel staras en la versiklo 14. Per tio estas alparolitaj la ankoraŭ nove konvertiĝintaj. Ili konas la Patron, ili aŭdis pri Dio kaj iliaj pekoj estas pardonitaj. Ili ekkonis la nepraĵon, ke iliaj pekoj estu pardonitaj. Tio estas la infana ŝtupo de la kredo, sed ili jam estas savitaj.

Tiu ĉi membrigo tamen estas en rilato al la gnozo pozitiva. Kaj aldone en la kampo kristana troviĝas diferenco al la gnostikuloj ankaŭ per la kresko en la kredo, sed neniam en supervaloreco super la simplaj kredantoj. Tiuj opinias, esti la sciantaj, kaj ili malrespektas la kredantajn. La komenca motivo estas la rekono de Dio kaj la pardono de la pekoj.

Kaj poste staras skribite pri la patroj:

Vers. 13: **Mi skribas al vi, patroj, ĉar vi konas tiun, kiu estas de la komenco. Mi skribas al vi, junuloj, ĉar vi venkis la malbonulon. Mi skribis al vi, infanoj, ĉar vi konas la Patron.**

Ili konas Dion kaj scias pri Lia esenco. La patroj rekonas, ke Dio ekzistas de ĉiam, el eterno al eterno, kaj ili jam havas pli profundan komprenon pri Dio. En la Biblio estas ĉiu vorto, ĉiu formulado grava. Ĉi-sube tio estas laŭvorte redirita. Li skribas: „Mi skribis“, do duoble emfazite.

**Mi skribas al vi, junaj viroj, ĉar vi la malbonulon venkis. Mi skribas al vi, infanoj, ĉar vi la Patron ekkonis.**

Tio ĉi estas en la versiklo 14 ripetita:

Vers. 14: **Mi skribis al vi, patroj, ĉar vi konas tiun, kiu estas de la komenco. Mi skribis al vi, junuloj, ĉar vi estas fortaj, kaj la vorto de Dio restas en vi, kaj vi venkis la malbonulon.**

„La junaj viroj“ markas ĉe tiu ĉi nocio: tiujn ĝis 40 jaroj, la plej bona vira aĝo. La junaj viroj aparte devas batali kontraŭ propraj tentoj. Ankaŭ la pli altaĝaj de tio

ne estas en sekuro. La junaj viroj la malbonulon venkis, sed – kaj tio estu emfazita: ne per sia propra forto!

Ĉar poste estas dirite: …vi estas fortaj, ja la vorto de Dio restas en vi. Ili daŭre havas la vorton de Dio ene de si. La Dia vorto estas duopa – unue Jesuo Kristo, la viva vorto de Dio, kiu perate de la Sankta Spirito en vi loĝas – kaj same estas la vorto de Dio la Sankta Skribo per si mem. En tiu ĉi vorto do ili vivas. Ili vivas de la Dia revelacio, legas la Skribon kaj estas riĉe pridonitaj.

Espereble ankaŭ ni eme legas la vorton de Dio, por ke ĝi riĉe en ni restu, ja nur tiukaze ni havas la forton, por venki la malbonulon.

Vers. 15: **Ne amu la mondon, nek la mondaĵon!**

Ĉi tie ne temas pri la bona kreitaro de Dio, sed per la nocio „kosmos“ (la mondo) estas signita principe la falinta mondo, kiu troviĝas en la aŭtoritata regiono de Satano pere de la unua peko.

Certe ni rajtas ĝoji pro la mondo: Dio ĝin mirinde kreis – la bestoj, kreskaĵoj, montoj, valoj, riveroj, lagoj kaj maroj, la homoj estas mirindaj kreitaĵoj de Dio. Sed troviĝas multo da pekoj, da tentoj, la fenomeno: manĝegi kaj esti manĝegata, da mensogoj, ŝteladoj, murdoj. Ĉiuj-ĉi aferoj ne estu de ni amataj. Antaŭ ĉio tiujn ĉi malbonajn aferojn ni devus elfuĝi kaj nin de ili deteni granddistance.

Ni ankaŭ ne devus glui nian koron al tio, ke ni poreterne volus vivi sur tiu ĉi planedo, kiel ajn ĝi estas bela. Ja ĝi estas subigita al la peko – kaj tiel oni nur plu po-ere povas rekoni, kiel senmakula tiu ĉi kreitaro origine estis. Jam delonge ĝi plu ne troviĝas en sia praformo. Ĉu ni vere volas poreterne vivi sur tiu ĉi planedo – aŭ ni ne antaŭĝojas plu pro la ĉiela gloro?

Konate troviĝas homoj, kiuj faras ĉion por tio, ke ili ne devus morti. Ili investas tre multe da mono por sia sanstato. Estas bone, se ni nian korpon flegadas, por ke ni povu servi al la Sinjoro, sed ni ne devus tion troigi. Pli grava ol la korpa ekzerco estas la diotimo. La korpa ekzerco utilas malmulte. Ĝi ne estas tute senutila, tamen nur malmulte utila. La diotimo estas riĉe helpa en ĉiuj aferoj.

Vers. 15: **Se iu amas la mondon, la amo al la Patro ne estas en li.**

La formulo pri „la Patro“ povas esti komprenata laŭ du manieroj. La amo, kiun Dio, la Patro al ni donacas – aŭ ankaŭ la amo, kiun ni por la Patro havas. La unua estas la amo, kiun la Patro por ni havas, la dua estas la amo, kiun ni por Dio havas.

Temas pri averta vorto. Ni ne devus fali ĉu en tiun ĉi, ĉu en la kontraŭan flankon. La demando stariĝas: Je kio nia koro dependu? Ĉu ĝi apartenas plene al Dio, la Sinjoro – aŭ ĝi vivas plene ĉi-tie, en la mondo?

Ni rajtas en tiu ĉi mondo agi, ni havas nian laboron kaj familion, nian taskon, sed ni devus vivi tiel, kvazaŭ ni havus nenion. Ni devus esti pretaj, ĉion lasi el

niaj manoj. Neniam ni scias, kiam la Sinjoro nin vokos de ĉi tie – ĉu ni estas pretaj ĉion formeti?

Estu, ke Dio staru sur la unua loko. Jesuo Kristo diras al ni, ke: „… kiu la patron, la patrinon, la infanojn pli amas ol min, tiu min ne meritas“. Tio estas tre kompleksa diraĵo kaj serioza vorto, kiun oni ne rajtas simple ignori. Nur tiam ni estas vere feliĉaj, se ni vivas tiel, ke ni havas, kvazaŭ ni ne havus.

Ni havas – tamen jam en la sekva momento tio povas esti el niaj manoj forprenita. Ĉu ni troviĝas en tia atendanta sinteno? Ja ni estos pridonacitaj per senkompare pli grandaj kaj gloraj aferoj. Ne povas troviĝi io pli granda ol tio, kio nin atendas en la ĉiela regno, nome Jesuo mem kaj lia glora nova kreitaro.

Ni rajtas ĝoji pri tio, kion Li al ni donacas. Kompreneble ankaŭ pri niaj familioj kaj infanoj, familianoj kaj amikoj, pri la glora naturo, kiun Li preparis. Ankaŭ pri la kulturo (muziko, bilda arto, poezio ktp.), se ili ne troviĝas en kontraŭdiro kun la biblia vero kaj etiko, kaj se tio vere esprimas estetikan valoron. Sed ni devus esti singardaj kaj pretaj iri, kiam la Sinjoro nin forvokas.

Kaj kiam ni renkontas la persekutadon pro nia kredo, ni ankaŭ devus esti pretaj, Lin ne malkonfesi, se ni troviĝus sub forta premo.

Vers. 16: **Ĉar ĉio, kio estas en la mondo, la dezirego de la karno kaj la dezirego de la okuloj kaj la fiereco de vivo, estas ne de la Patro, sed de la mondo.**

Ĉi tie estas parolo pri la peko de tiu ĉi mondo. Ne la mondo entute estas dirita kiel peko, sed tio, kio fakte la pekoj estas. La deziregо de la karno signifas ne nur la seksualan pekon, sed ĉion, laŭ kio nia naturo laŭ la malnova Adamo sopiras: riĉeco, povo, influo, perversa seksualeco, ekspluatado de aliaj, paŝi trans la kadavroj … ĉiuj-ĉi ekzemploj montras la deziregon de la egoo en ni.

La okulo estas aparta invadpordo por tentadoj. Ni ekvidas certan bildon kaj iĝas per ĝi tentataj. Oni vidas oron kaj volas ĝin posedi. Oni rimarkas aŭtomobilon de najbaro kaj volas akiri ankoraŭ pli grandan. Oni rigardas la domon de najbaro kaj volas masoni ankoraŭ pli grandan. Envio kaj ĵaluzo, posedemo kaj okulaspiro. La okulaspiro estis, kiu finfine la malpermesitan frukton por Eva faris tiel alloga. La frukto estis bela por rigardo kaj aldone ĝi havis reputacion, fari la homon sagaca.

La lasta nomita afero, laŭvorte estas dirita: Paradi per la surtera vivo. Per tio, kion la tera ekzisto enhavas. La Sinjoro Jesuo ofte parolis pri la trompo de la riĉeco. Nome, ĉio, kio servas al tio, ke la homo havu influon al la mondo, ke li en ĝi povas sin granda prezenti kaj grandajn aferojn efektivigi, kio signifas la vivon arogantan. En la greka origino ĉi tie staras la vorto *bios* (la surtera vivo) kaj ne *zoe* en la senco de eterna vivkvalito.

Vers. 17: **Kaj forpasas la mondo kaj ĝia deziregо; sed la plenumanto de la volo de Dio restas por eterne.**

Tio estas nia konsolo kaj nia espero, se ni ne akordiĝas al la mondo, sed nin distancigas de ĉio, kio malbona estas, helpe de Dio. Poste ni havas promeson de nia vivo en eterno. Se ni efektivigas la volon de Dio, Jesuon postsekvas kaj iras laŭ liaj piedsignoj – sur la mallarĝa vojo post la ŝafido. Estu ke la Sinjoro al ni portio donacu gracon kaj forton. Amen.


*Ni preĝu:*

*Kara Sinjoro Jesuo Kristo. Dankon, ke vi kiel proparolanto ĉe la Patro staras kaj por ni petegas: „Patro, diru tiun ĉi infanon libera, ja li estas Via infano.“ Dankon, Sinjoro Jesuo, ke vi donis oferon por nin elaĉeti en liberon, estante viaj infanoj. Donacu al ni gracon kaj parolu al ĉiu koro. Igu nin postsekvi vin en amo, humileco kaj mildeco. Ni adoras kaj gloras vian nomon. Amen.*

*Elprenaĵo el la nova libro de Lothar Gassmann:*

***LIEBE, WAHRHEIT, WANDEL IM LICHT. Die Botschaft der drei Johannesbriefe (Amo, vero, irado en la lumo. La mesaĝo de tri epistoloj de Johano)**, 208 Seiten, 14,80 Euro:* Spuren Verlag**,** Maganbertstr. 5, D-36041 Fulda, Tel.: 0661 250 554 80, Fax: 0661 250 554 81, E-Mail: info@spurenverlag.de , www.spurenverlag.de

Vero kaj amo apartenas maldisigeble kune. Validas diri veron en amo kaj el la amo la veron ne prisilenti. Dio estas amo. Jesuo estas la vero kaj la nura vojo al la savo. Amo, vero kaj la irado en la lumo – jen tio estas la mesĝo de la tri epistoloj de la apostolo Johano. Tiu ĉi eksegezo aplikas la biblian vorton por la aktuala tempo kaj ebligas ĝin por nia vivo tute praktike funkciigi.




La plej nova libro
*de Lothar Gassmann:*

# Jesus Christus

**Seine Liebe, Kraft und Herrlichkeit**

La vivo kaj agado de la Savanto ek de la naskiĝo el virgeco ĝis la ĉieleniro kaj denova re-veno. Pura biblia orientigo
-kajero 1

Religia fondinto, pacpredikanto, socialrevoluciulo – multo estas pri Jesuo asertita, tamen, ĉu ĉio vera? En tiu ĉi libro estas la vivo de Jesuo ek de lia virga naskiĝo ĝis lia resurekto kaj ĉieleniro per biblia fideleco prezentata kaj same estas indikite pri lia denova alveno. La aŭtoro restas ĝisdetale fidela al la Biblio kiel la bazo por la kristana kredo. Tiel li venas al la rezulto: Jesuo Kristo estas la Filo de Dio kaj la nura vojo en la ĉielon.

**La enhavo:**

- Kiu estas Jeso Kristo?
- La virga naskiĝo de Jesuo
- La bapto de Jesuo
- La tentado de Jesuo
- La instruo de Jesuo
- La disĉiploj de Jesuo
- La mirakloj de Jesuo
- La postsekvo de Jesuo
- La morto de Jesuo sur la kruco
- La entombigo de Jesuo
- La resurekto de Jesuo
- La ĉieleniro kaj la reveno de Jesuo

Hardcover
276 paĝoj
Art. N-ro 408114

Prezo: € 14,80
ISBN 978-3-940040-11-4

**Spuren Verlag**
Maganbertstr. 5
D-36041 Fulda
Tel.: 0661 250 554 80
Fax: 0661 250 554 81
E-Mail: info@spurenverlag.de
www.spurenverlag.de



## *Strange …*

*… ke 100 eŭroj ŝajnas esti tioma multo, se oni ilin donacas en la preĝejo,*
*sed tioma malmulto, se oni per ili iras aĉetumi.*

*… kiom longe ŝajnas daŭri, servi Dion dum unu horo,*
*sed kiel rapide 60 minutoj de uitbalo preterpasas.*

*… se ni ne havas ideon, kion diri preĝante,*
*sed ni ĉiam povas al niaj amikoj senĉese pri io rakonti.*

*… kiel malfacile estas, unu ĉapitron el la Biblio legi,*
*sed kiel facile, 100 paĝojn de bone vendata romano konsumi.*

*… kiel oni okaze de koncerto penas ricevi lokon en la unua vico,*
*sed en la preĝejo oni konkurencas por la malantaŭaj sidlokoj.*

*… kel malfacile estas por la homoj, la ĝojan mesaĝon de Jesuo kolporti,*
*sed kiel facile, kolporti la plej novan klaĉaĵon.*

*… kiomaj la amaskomunikilojn kredas,*
*sed esprimas dubojn pri tio, kion la Biblio diras …*

*Prenita el: Herold Seines Kommens, Septembro 2006*